



ISSN 0006-9477



104-a jaro
N-ro 339
Decembro 2011

TAGUATINGA VOKAS VIN

47^a BRAZILA KONGRESO DE ESPERANTO

**32^a BRAZILA ESPERANTISTA JUNULARA
KONGRESO**

10^a INFANA KONGRESETO

Kovrilo

Sur la kovrilo troviĝas la foto de Taguatinga, kie okazos la 47^a Brazila Kongreso de Esperanto, de la 15-a ĝis la 19-a de januaro 2012. Taguatinga estas grava urbo, konata kiel la ekonomia ĉefurbo el Federacia Distrikto.



Foto de Taguatinga (DF).

- 03** Ĉefartikolo
- 04** Poemo: Geraldo Mattos
- 05** Omaĝo: Maria Eloá de Souza Lima
- 07** Opinio: Ismael Gomes Braga
- 08** Eventoj
- 09** Historio: BEL-Estraro
- 10** Opinio: Paulo Nascentes
- 14** Artikolo: Benedicto Silva
- 15** Artikolo: Aymoré Vaz Pinto
- 17** Kroniko: BEL-Estraro
- 18** Forpaso

Eldiro

"Estu certaj ke, praktikante Esperanton kun pacemo kaj solidareco en la koroj, ni kontribuas por la kreo de mondo pli bona."

Walter Francini (SP, 1926/1996) estis instruisto de portugala lingvo kaj literaturo, ĵurnalisto, verkisto kaj lerta paroladisto.

Revukunlaboraĵoj: La ĉefredaktoro rigardas gravajn kunlaboraĵojn senditajn de la legantoj. Tamen, pro hommanko, spaclimigoj en la revuo, kaj kromaj limigoj, li rezervas al si la rajtojn: **1-e:** Ne sciiĝi la ricevon; **2-e:** Ne redoni la sendaĵojn; **3-e:** Ne garantii publikigon; **4-e:** Mallongigi tekston tiam, kiam necese; **5-e:** Ĝin reviziigi laŭ ortografia, gramatika kaj terminologia aspektoj. Kiel gramatikan konsultfonton ni rekomendas la verkon "Plena Manlibro de Esperanta Gramatiko", de Bertilo Wennergren. La signifon de ĉiuj vortoj netroveblaj en "Plena Ilustrita Vortaro de Esperanto" (2005) oni aparte klarigu per glosaro.

Anonctarifo: Tabelo pri prezoj (Brazila Esperantisto) Onoj de paĝo (anoncoj)

● Komercaj markoj reproduktitaj celas nur ilustri kaj apartenas al la posedantoj

tutpaĝa (19x25cm)
4-a kovrilo R\$ 900,00 (kolora)
2-a kaj 3-a kovriloj R\$ 600,00
(nigra-blanka)

1/2 duonpaĝa (9x24cm)
R\$ 450,00 (kolora)
R\$ 300,00 (nigra-blanka)

1/3 trionpaĝa horizontale
(8x18cm) R\$ 300,00 (kolora)
R\$ 200,00 (nigra-blanka)

1/3 trionpaĝa vertikale
(8x18cm) R\$ 300,00 (kolora)
R\$ 200,00 (nigra-blanka)

1/6 sesonpaĝa (7.8x8.8cm)
R\$ 150,00 (kolora)
R\$ 100,00 (nigra-blanka)

Novjaran Saluton

Estas plezuriga tasko esprimi novjaran saluton al vi. Sed aliflanke estas nia devo pripa-
roli la malfacilaĵojn rilate la laboradon de Brazilia Esperanto-Ligo. Ne estas eble ĉi tie
detale analizi ĉiujn aspektojn de tiu situacio, sed necesas jam nun atentigi pri la du
ĉefaj problemoj, kiuj obstaklas aŭ kelkfoje malebligas la pluan disvatigatiĝon de Esperanto
en nia lando. Evidente ni parolas pri la manko de laborantoj en nia sidejo kaj pri la manko
de mono. Estas multe da taskoj kaj malmulte da kunlaborantoj, kvankam kelkaj samideanoj
volontulas kvazaŭ profesie sed sensalajre. Danke al Dio!

Evidentiĝas la konstato, ke la kotizoj pagataj de niaj membroj ne sufiĉas por prilabori
certajn aferojn tiom profunde, kiom oni volus, kaj ke certaj iniciatoj restas morta litero. La
administrado de BEL, laŭ financa vidpunkto, estas malfacilega tasko. Pro tio mankas centoj
da anoj kaj iliaj kotizoj.

Ni profitas la okazon por averti bonintencajn samideanojn. Ne postulu aferojn neplenu-
meblajn. Ne klopodigu niajn laborantojn per fataziaj proponoj, sed koscii, ke krom bona
volo, necesas ankaŭ mono.

La estraro de BEL unuanime esprimas tutkoran dankon al la samideanoj kiuj finance hel-
pas nian institucion, aliĝinte kiel BEL-ano. Ni esperas, ke la samideanoj kiuj ne jam pagis la
kotizon tion faros senprokraste. Esperantujo bezonas verajn esperantistojn. Veraj esperan-
tistoj aliĝas al la Esperantaj organizaĵoj. Ĉiuj brazilaj esperantistoj devas konvinkiĝi, ke nia
laboro, ke nia aktiveco dependas de ni ĉiuj. En la venonta jaro ni devas mobilizi niajn fortojn
por sukcese plenumi niajn taskojn. La kampo por agado estas vasta.

Ni partoprenu la nacian kongreson, kiu estas okazo de grava interŝanĝo de ideoj. Ni espe-
ras, ke la interŝanĝo de ideoj estas agrabla kaj fruktodona. Oni povas supozi, ke en Taguatin-
ga vigla entuziasmo regos.

La estraro de BEL deziras al vi bonan novan jaron (2012) kaj bonan sukceson en via laboro.



Brazilia Esperantisto

ISSN 0006-9477

Oficiala Organo de Brazilia Esperanto-Ligo

Fondita en 1907 de Alberto A. Vieira, Reynaldo Geyer kaj Everardo Backheuser
104-a jaro - Junio 2011 - N-ro 337

Eldona Stabo

Respondeca ĵurnalistoj: Viviane Castro

Ĉefredaktisto: Eurípedes Alves Barbosa

Ĉi-numeraj kunlaborantoj: Benedicto Silva, Francisco Stefano Wechsler, Paulo Sérgio Vianna

Grafika aranĝo kaj enpaĝigo: Viviane Castro

Revizio kaj tradukado: Eldona Komisiono

Presejo: Gráfica Sergipe (Brasil/DF)

Kontribuojn kaj mesaĝojn sendu al la retadreso de la ĉefredaktisto: euripedes-barbosa@ig.com.br

Pri la subskribitaj artikoloj respondecas la aŭtoroj mem

Brazilia Esperanto-Ligo

Fondita en 1907



Sidejo SDS - Bloco P,36 - salas 301/303 - Ed. Venâncio III CEP 70393-902 - Brasília/DF
Telefona (0xx61) 3226 1298 Fakso (0xx61) 3226 4446

Retadreso bel@esperanto.org.br Hejmapaĝo www.esperanto.org.br

Estraro

Prezidanto S-ro Lício de Almeida Castro Vic-prezidanto S-ro Eurípedes Alves Barbosa
1-a Sekretario S-ino Sufia Alves de Lima 2-a Sekretario S-ro Carlos Alfredo Aragón Guerreiro
3-a Sekretario S-ro Devanizio Apolinário dos Santos
Financa Direktoro vaka Kasisto S-ro Darci Gomes Sardinha

Kontrola Konsilantaro

Aymoré Vaz Pinto, José Carlos Dorini Ramos, Adolpho de Miranda Silva, Lia Milhomem Moreno,
Cleto Galvão da Silva, Evandro Ferreira de Avellar

Federacia Konsilantaro

Prezidanto S-ro José Roberto Tenório da Silva

Komitato-A Paulo Nascentes

Ĉefdelegito de UEA James Rezende Piton

Kristnasko

Geraldo Mattos

La festo de Kristnasko fine venas
Kun sia sorĉe lumaj bondeziroj
Kaj la pastrar' en laŭtaj panegiroj
la enkarniĝon de Jesu' solenas...

Okulojn de infanoj fikse tenas
ludplenaj magazenoj kaj foiroj,
en kiuj nekristanaj dikaj viroj
la daton pro la vendebleco benas...

Dum katedraloj mesoj grandiozas,
mizeraj sur la stratoj peralmozas
malĝojan tagon, kiel la ceteraj...

La kristo de la stal' amare plendas,
ĉar lia naskevento sin prezentas
okazo por negocoj pli prosperaj...

GERALDO MATTOS

poeto, universitata profesoro(emerita), eksprezidanto de Akademia de Esperanto, aŭtoro de pluraj libroj, inkluzive de lernolibroj. Li naskiĝis en Rio de Janeiro en la jaro 1931.

Eminentaj virinoj en la Brazila Esperanto Movado

MARIA ELOÁ DE SOUZA LIMA



Oni scias, ke estas esperantistoj izolitaj en multaj interlandaj urboj. Malgraŭ tiu izoleco kaj la koncernaj malfacilaĵoj, ili senlace laboras por nia idealo. Por ekzemplo, valoras mencii nia samideanino Maria Eloá de Souza Lima, kiu loĝas en la fora urbo Jataí, ŝtato Goiás.

La urbo Jataí distancas de Goiânia, ĉefurbo de Goiás, 327 kilometrojn, kaj en ĝi loĝas 85 mil homoj.

Maria Eloá naskiĝis la 27-an de junio 1922, en la Fazenda Santa Clara (Bieno Sankta Klara), Goiás, loko nuntempe nomata Serranópolis, proksime de Jataí. Ŝi naskiĝis kiel filino de kamparanoj, kaj en 1947 edziniĝis kun Antônio Cândido Lima. Ili havis unu filinon.

Ŝi eklernis Esperanton en la 1950-aj jaroj per radiokurso gvidita de Torres Pastorino (Rádio Mundial, el Rio de Janeiro), kaj en 1961 ŝi translokiĝis al Jataí.

En 1962, septembre, fondiĝis Jataí Esperanta Asocio, kies unua estraro estis: prezidantino - Maria Menezes Carvalho; vic-prezidanto - Frei Domingos; unua sekretario - Arnaldo Carvalho; dua sekretario - Samuel Menezes Carvalho; unua kasistino - Caçula Souza; dua kasisto - Cloves Borges da Silva; bibliotekistino - Célia Maria de Lima; ĝenerala sekretario - Maria da Conceição de Souza; sociala direktorino - Maria Eloá de Souza Lima.

La Asocio ekzistis proksimume du jarojn. Ĝi fermis la pordojn pro la persekutado farita de policistaj aŭtoritatuloj, komence de la militista reĝimo (1964).

Maria Eloá loĝis kelkan tempon en Goiânia, kiam ŝi estis la dua sekretario de Goiânia Esperanto-Klubo, dum la oficperiodo 1967/1968. Tiutempe, ŝi kune kun Humberto Ferreira kaj Francisco Rodrigues Sobrinho respondicis pri la tasko ekzameni la kursfinintojn.

Pro la politika aktivado, ŝi restis ekster nia movado multe da jaroj. Maria Eloá estis membro de la Komunista Partio kaj poste de la Partio de Laboristoj (portugallingve: Partido dos Trabalhadores).

Reveninte al nia movado, ŝi ekinstruis Esperanton en Jataí, kaj la 13-an de aŭgusto 2005, Eloá kaj aliaj lokaj esperantistoj fondis la organizaĵon Esperanto-Klubo Jataí, kiu fermis la pordojn post nelonge, sed la 29-an de novembro 2008, ili fondis alian institucion, nome Esperanto-Klubo Verda Vojo, ankoraŭ prezidita de nia kara samideanino. Nuntempe, Maria Eloá instruas Esperanton ĉe la Federacia Universitato de Goiás.

Nia samideanino verkis portugale la jenajn librojn: Serra do Cafezal (retratos e lembranças), Serra do Cafezal 2 (outros retratos e outras lembranças), Mariquinha do Sobrado kaj Ana Prudenciana. Ŝi ankaŭ verkis artikolojn pri Esperanto, kiuj aperis en la ĵurnalo "Folha do Sudoeste".

En la 24-a de junio 2010, en Jataí, okazis solenaĵo kiam la aŭditorio de Kultura Centro Basileu Toledo França estis nomata "Maria Eloá de Souza Lima", justa omaĝo al tiu samideanino. Pro sia literatura agado, ŝi ankaŭ ricevis ĉijare la medalon "honora merito", liverita de la gojasa registaro.

Sendube Maria Eloá ludas gravan rolon en la Esperanto-movado kvankam alfrontante malfacilaĵojn por disvastigi la lingvon en la fora urbo Jataí. Ŝi senlace multe laboris kaj laboras por nia idealo.



Jataí, urbo kie loĝas Maria Eloá.

Klasikaĵoj

Ismael Gomes Braga

Pro ofica devo kaj persona temperamento mi ne povas obei la saĝan konsilon de nia eminenta akademiano kaj majstro Prof. Dr-o Porto Carreiro Neto, laŭ kiu oni restu ĉiam lernante la lingvon laŭ la zamenhofaj modeloj. Mi oficas kiel recenzisto de la novaj verkoj aperantaj en nia lingvo kaj devas studi tiujn modernajn librojn. Laŭ mia temperamento mi havas grandan korespondon kaj kunlaboras en gazetoj kaj revuoj; tial, anstataŭ kaŭri dumvive sur la klasikaĵoj, ekde la junaĵo mi senĉese uzadas la lingvon kaj neniam havis tempon por ĝisfunde ellerni ĝin.

Por ĝisfundulo nur la lernado gravas, ĉar la lingvo mem estas lia celo. Por aliaj nur la uzado gravas, ĉar la lingvo estas nur laborilo, kiun oni devas akiri kiel eble plej rapide.

En Esperanto la tasko de la ĝisfundulo estas grava, ĉar ĝi tenas la tutmondan unuecon de la stilo, dum la revolucia rapidemulo endanĝerigas tiun unuecon per senpripensa pasio labori per tiu instrumento. Ĝisfundulo bremsas la veturilon de la progreso kontraŭ danĝeraj kuroj; sed oni ne timu la mortigan stagnon fare de la ĝisfundulo, ĉar li nur lernas, preskaŭ tute ne verkas; dum la rapidemulo multe babilas, verkas senĉese kaj estas legata.

Ambaŭ gravas por la progresado, kaj ambaŭ pravas. La progreso multon novan kaj malnovan forbalaas, sed tenas ĉiam la plej bonan kaj belan.

La plej legata verkisto en Esperanto, same kiel en la ceteraj lingvoj, ne estas ĝisfundulo nek fuŝulo, li estas la plej talenta.

La graveco de Zamenhof kiel klasika esperantisto ne venas de la fakto, ke li estis la Aŭtoro de la lingvo, sed de tio, ke li estis la plej talenta uzanto de nia idiomo. Li produktis tutan serion de bonegaj libroj. Liaj tradukoj estas vere talentaj. Li ne estis ĝisfundulo nek supraĵulo, li estis talentulo.

Neniu alia aŭtoro de projekto de L.I. estis talenta verkisto; ili nenion gravan verkis en siaj projektoj, kiuj ja mortenaskiĝis, pro manko de verkista talento.

Kvankam la modernaj talentuloj en Esperantujo verkas tre belajn librojn, Zamenhof restos ĉiam nia unua klasikulo.

(El la revueto Esperanto Triumfonta, n-roj 3/6, septembro-decembro 1955)

B
r
a
z
i
l
a

E
s
p
e
r
a
n
t
i
s
t
o

7

N
r
o

3
3
7

J
u
n

2
0
1
1

47^a BRAZILA KONGRESO DE ESPERANTO

TAGUATINGA, FEDERACIA DISTRIKTO, BRAZIL
PERIODO: De la 15-a ĝis la 19-a de januaro 2012

RESUMA PROVIZORA PROGRAMO

Dimanĉo, 15/01/2012

Festivalo de indiĝenaj lingvoj(Kiu ne aliĝis al la kongreso ankaŭ rajtas partopreni festivalon)

Solena Malfermo - 17/19h

Arta Vespero - Miquéias Paz (mimo)

Lundo, 16/01/2012

8/10h – Kunsido de Federacia Konsilantaro

10/12h – Ĝenerala Asembleo de BEL

14/15h - TEMPLO DE BONA VOLO — DOMO DE NI ĈIUJ. (Felipe Duarte)

14/15h - Bona Espero (Giuseppe kaj Ursula Grattapaglia)

14/17h - Kurso de Esperanto por komencantoj (Jair Sales)

15/6h - Universala Kongreso (Graça Tuller)

15/16h - Pripensante la tradukadon (J. J. Santos)

16/17h - Zamenhof: hebrea homarano libercredita (Nazaré Laroca)

16/17h - Daŭripovo kaj tradiciaj agrikulturaj metodoj (Maarten Deprez)

17/8h - Fakokunsido de Oomoto (Sr Shigeki Maeda)

17/18h - Júlia Lopes de Almeida: de famo al forgeso (Francisco S. Wechsler)

17/18h - Pluraj rigardoj de la kritiko pri la lernolibro Esperanto por lernejoj klasoj (Paulo Nascentes)

20/22h - Arta Vespero

Mardo, 17/01/2012

09/10h - Rio +20 (Alvaro, Giuseppe e Ursula)

09/11h - Joaquim Jose - Fiduplena Martiro (Amarílio)

09/11h - Trejnigo de instruistoj per la lernolibro ELK (Josias Barboza)

09/11h - Paroliga Kurso (José Roberto A. Albuquerque)

10/11h – La kialoj de la mizerokaj kiel venki ĝin (AS CAUSAS DA MISÉRIA E SUA SUPERACÃO - o domínio pela comunicação) - Ulisses Ridel

11/12h30 - Kiel Instrui Esperanton per la Miksa Metodo (Jair Sales)

11/12h30 - Diskutrodo: Leĝo Cristovam: kiel alfronti la defiojn? (Kunordiganto: Paulo Nascentes)

11/12h30 - Cirkla Danco (Maria Luiza Rocha)

14/15h - La vojaĝo de La Karavelo (J. J. Santos)

14/15h - Brazila Esperantisto: memoro de la brazila esperanto movado (Néia Lúcia Souza)

14/16h - Lorenz (Dr. Elmir dos Santos Lima)

14/17h - Kurso de Esperanto por komencantoj (Jair Sales)

15/16h - Pripensante la tradukadon (J. J. Santos)

16/17h – La verko A Arma Escarlata (Renata Ventura)

16/17h - Enkonduko En La Fontlibraron De La Fundamenta Esperanto (Luiz Claudio)

17/18h – Debato pri la temo de la Kongreso

21/22h - Arta Vespero

Merkredo, 18/01/2012

09/18h - Ekskursoj

20/22h - Arta Vespero

Ĵaŭdo, 19/01/2012

9/10h - Kien iras nia Movado? (Márcio Santos)

09/11h - Kurso de Esperanto por komencantoj (Jair Sales)

09/11h - Paroliga Kurso (José Roberto A. Albuquerque)

10/11h - Internacia Angla kaj Esperanto: Ĉu konkurantoj? (Adonis Saliba)

11/13h - Solena Fermo

Aperis en la Esperanto-gazetaro antaŭ multaj jaroj

BEL-Estraro

ESPERANTO MALPERMESATA

Ni bedaŭras informi la tutmondan Esperantistaron, ke la portugala ministro por internaj aferoj oficiale malpermesis la propagandon kaj instruadon de Esperanto en la portugala teritorio.

La ŝtatpolico PIDE (polico por internaciaj aferoj kaj ŝtatdefendo) traserĉis la hejmojn de la direktoroj de Portugala Esperanto-Ligo kaj konfiskis, 23.8.49, ties arkivojn, bibliotekon kaj ceteran dokumentaron.

La nomita Esperanto-organizo estas oficiale likvidita de la ŝtatpolico. Ĉiuj leteroj surhavantaj glumarkojn de Esperanto estos konfiskataj laŭ informo de la aludita polico. La portugala Esperantistoj petas la specialan atenton de la eksterlanda Esperantistaro pri ĉi tiu informo! Precipe orient-eŭropaj Esperantistoj estas petataj ne skribi al la portugala Esperantistoj ĉar la ŝtatpolico estas speciale interesata pri la rilatoj inter portugaloj kaj orient-eŭropaj Esperantistoj!

(Revuo Esperanto, oficiala organo de UEA, n-ro 530, decembro 1949)

BRAZILO

Okazis la 3-an de oktobro balotado por la Prezidenteco de Brazilo. Unu el la kvar kandidatoj estis Dumviva Membro de Brazila Esperanto-Ligo kaj de Universala Esperanto-Asocio, D-ro Ademar de Barros. Intervjuate de la grava revuo "Manchete" (eldono de la 2-a de aŭgusto 1955), D-ro Ademar de Barros deklaris, ke li havas amikojn en Ameriko kaj en Eŭropo, kaj ke li estas universalisto kaj partiano de la paco kaj de Esperanto. Dum du oficperiodoj li jam regis la grandan ŝtato São Paulo kun eksterordinara aktiveco kaj efiko."

(Revuo Esperanto, UEA, n-ro 600, novembro 1955, paĝo 309)

Pluraj rigardoj de la kritiko pri la lernolibro Esperanto por lernejaj klasoj

Paulo Nascentes¹

Barboza, Josias. Esperanto por lernejaj klasoj 1: paroliga metodo kun ekzercaro. Braziljo: Unio Planeda: Brazila Esperanto-Ligo, 2008. 150p. Ilus. Kun kd. ISBN 8588913062. [kaj] Esperanto por lernejaj klasoj 2: paroliga metodo kun ekzercaro. Braziljo: Unio Planeda: Brazila Esperanto-Ligo, 2008. 164p. 28cm. Ilus. Kun kd. ISBN 8588913054 kaj respektivaj Gvidlibro por instruistoj.

10 Enkonduko

Respondeca lingvoinstruado petas instrumaterialon taŭgan por kontentigo de kelkaj nepraj demandoj, ekzemple: kia lernanto, aĝo, antaŭaj spertoj kaj konoj, motivigoj, kie kaj kiam okazos la renkontiĝoj. Se temas pri instruado en lernejoj, nepre temas ankaŭ pri formala, kontinua, sistema instruado. Kvankam neformala instruado de Esperanto ankaŭ dezirindas, kiel disvastigilo de la Lingvo Internacia, instruado profesia tamen altnivele konkeru teritorion de lernejoj kaj superaj institucioj. Kadre de tiu situacio, plene praviĝas analizoj kaj kritikoj de lernocelaj verkoj.

Antaŭ ne longe Eldonejo Unio Planeda kunlabore kun Brazila Esperanto-Ligo aperigis la instrukompleton de Profesoro Josias Barboza ***Esperanto por lernejaj klasoj 1 kaj 2*** (ELK). Ĉar temas pri nova lernolibro en la lingvoinstrua merkato, kelkaj demandoj neeviteblas: Kiun publikon ĝi celas? Kiun me-

todologion ĝi uzas? Kion ĝi postulas de la instruistoj? Kiun nivelon ĝi atingas? Kiel ĝi aspektas? Kiujn ĉefajn apartajn trajtojn ĝi havas? Kiel ĝin akceptas la instruistaro kaj la kritiko? Kiom ĝi kostas? Kion pri ĝia ebla estonto?

Per fakaj recenzoj, reliefigante malsamajn aspektojn, respondas tiujn kaj aliajn demandojn Nascentes (2007), Tenorjo (2009), Kováts (2010), Llinars (2010), MacGill (2011) kaj Opulskiené (2011).

En Brazilo nur du recenzoj publikiĝis pri ELK. En aliaj mondopartoj, tamen, pluraj recenzoj aperis. Interesas trarigarda komento pri la plej gravaj fakaj opinioj aperintaj en la E-gazetaro. Komparo inter tiuj kritikoj ne eblas, eĉ ne taŭgas, pro iliaj malsamaj celoj, metodologioj, celpublikoj. Pro ĝia plej ampleksa kaj kompleksa enhavo, nia rigardo iom pli daŭros sur la postdiplomiga finlaboraĵo de José Conde Llinars, ***Komparo de E-Lernolibroj***: alproksimigo al la analizo pri la taŭgeco de la E-lernolibroj, prezentita

al la kurso Instruista trejnado de UAM-ILEI en la Universitato Adam Mickiewicz, Poznań, Pollando.

Recenzoj

La revuo *Brazilei* kaj la por eduka portal *Edukado.net* publikis la pioniran recenzon de Nascentes (2007). Fakte ĝi estis la unua aperinta, pro tio ke ELK estis jam konata de la Recenzisto ankoraŭ en sia unua hejmfarita versio, ĉar per tiu instruilaro li eklernis Esperanton de la Aŭtoro mem, kaj per ĝi instruis en Universitato de Braziljo. Ekde tiam (2005-2008) multaj plibonigoj aldoniĝis. La spertoj kiel kursogvidanto ebligas al Nascentes taksu la verkon plej klare, ĉar eblas observi, kiun efikon ĝi havas por diversaj tipoj de lernantoj laŭ aĝo, motivo, lernokapablo kaj antaŭaj kontaktoj kun la lingvo.

Pro bezono konigi la instrukompleton tiam lanĉota libroforme, Nascentes (2007) pli longe devis priskribi la modelon de ĉiu lecionsekcio kun komento de pluraj ekzemploj el ĝi elĉerpitaj. Emfazo pri la aspektoj rekta, konversacia, grupa, ludiga, paroliga, negramatikeca evidentiĝas tiam.

Tenorjo (2009) enkondukas sian artikolon per ampleksa kuntestigo de la E-lerniloj plej konataj en Brazilo antaŭ la aperigo de ELK kaj bedaŭras, ke ĝi aperis en cirkonstancoj ne favoraj: *“La tuto aspektas tiel plaĉe aranĝite kaj bone programite, ke mi iom bedaŭras tion diri: Esperanto por lernejoj klasoj ne estas instrumaterialo por la nuntempo, sed por la estonteco (almenaŭ de nia enlanda Esperanto-movado). Tiu observo tamen ne estas kritiko, sed laŭdo, kiun mi tiel pravigas”*. Apogite al tiu tezo, li prezentas kvin pravigojn: la unua pri la bezono de instruista trejnado por ŝanĝo je la maniero instrui; la dua pri la kio-

mo de lernantoj rekomendata de la Aŭtoro por ĉiu klaso, foje ne facile atingebla; la tria pri la alta prezo de ELK rilate al la brazila eldonmerkato, spite al ĝia alta kvalito; kvare, pri la bezono de longdaŭraj kvar sesmonatoj por ĝia utiligo kaj kvine:

“Pro la novigo mem de la instrupropono de Esperanto por lernejoj klasoj, la aŭtoro zorgis, ke la reĝisoroj de sia instrumaterialo ne multe baraktu dum la gvidado de la lecionoj kaj pretigis gvidlibron kun marĝenaj notoj, sugestoj kaj rimarkoj, kaj ankaŭ KDon kun presebla help-materialo. Aldone al tio, la aŭtoro ankaŭ estigis retejon <<http://www.lernejojklasoj.net>> cele plu servi la kursogvidantojn. Tiuj novaĵoj estas ja tre bonvenaj, sed, laŭ mi, ankoraŭ ne sufiĉaj por garantii sukceson de la metodo sub reĝisorado, ekzemple, de tradiciemuloj. Kiuj jam profesie gvidas kurson pri iu moderna lingvo, certe trovos la instrumaterialon tre hejmeca. Kiel mi jam diris supre, en la enkonduko, la instruistaro bezonas ne nur profesion instruilaron, sed ankaŭ profesion trejnadon. Mi konstatas, kun ĝojo, ke la aŭtoro ŝajnas tre zorgema pri la sukcesa uzado de sia instrumetodo. La publikigo de la menciita retejo estas promesdona ekzemplo. Ni ne miru do, se baldaŭ tie anonciĝos trejnkursoj por interesiĝantoj testi la novan instrumaterialon.” (<http://www.gazetejo.org/node/1955>)

Kováts (2010) reliefigas, *“ke jam la unua volumo de la instrukompleto agordiĝas kun la rekomendoj de la Konsilio de Eŭropo en ĝia Komuna Eŭropa Referenckadro (KER), kiu celas unuecigi la mezuradon de lingvokapabloj de lernantoj kaj kandidatoj”*. Pri menciita trajto, la negramatikeco, tiel tekstas ŝia analizo:

“La gramatikaĵoj trateksas la libron, prezentiĝas en klaraj kaj bone struktu-

ritaj resumo, tamen ne fariĝas unuagradaĵoj de la lingvolernado. Ilin la kursanoj alproprigas en la multnombraj ekzemplofrazoj tra la sennombraj dialogoj kaj ekzercoj, kiuj ne malhavas kulturajn konojn pri Esperanto stimulon al transkultura komunikado pere de la internacia lingvo”.

Fine Kováts aludas la eblan aprobiĝon de la leĝoprojekto Cristovam (proponantan nedevigan Esperantoinstruadon por brazilaj mezgradaj lernejoj, kaj asertas, ke, ĉikaze, *“la brazilanoj jam havas bonan lernolibran kandidaton kaj modele kaj efike laborantan landan ILEI-sekcion. Restas nur la grandaj taskoj trejni sufiĉajn instruistojn kaj ekinstrui Esperanton”.*

MacGill (2011) reliefigas la allogan formaton de la kajeroj, ĝiajn buntajn kaj kolorajn ilustraĵojn, la metodon paroligan kaj situacion komunikan. Same kiel ceteraj eŭropaj kolegoj, li bonvenigas tion, ke *“kajero unu atingas la KER-nivelon B1, la dua kajero B2”.* Tuja ekparolo interaga de la lingvo kaj la maniero pritrakti gramatikaĵon ekde la unuaj lecionoj estas aliaj komentoj. Tekste, legiĝas:

“La unuaj lecionoj prezentas salutojn kaj ĝentilaĵojn – tiel ke klasanoj povu tuj ekparoli la lingvon interage. Ĝi tion faras ne timante kompleksecon – tie vi vidas refleksivon, adverbojn, akuzativon, akordigon, imperativon. Ĉio sen gramatika klarigo – sufiĉas prizorgi tion en postaj paŝoj.

Laŭdinde aperas tie komence la modela frazo: “Kion signifas ‘bildo’?” tiel ke kaze de uzo de nekonata vorto lernanto ne devas tuj regresi al nacia lingvo por peti klarigon”.

Kiel sciite, estas tikla debato pri la bezono kaj taŭgeco instrui aŭ ne la formalan gramatikon. Fakte, ĉe ELK konstateblas, ke la lernanto unue uzas gramatikajn strukturojn kaj imitas modelan uzon. Nur iom post iom klarigoj aperas. MacGill atentigas nin pri la *“kon-*

ciza verbo-resumo sur p. 69 de la dua kajero” per kiu la vort-trezoro ne fariĝas tro substantiv-dependiga. Kaj li klarigas: *“Similaj bonaj resumo troviĝas pri prepozicioj, korelativoj, afiksoj kaj proverboj. La libro, kvankam situacia, ne timas eksplicite prezenti gramatikon – kiel cetero ĉiam pli faras tiutipaj lerniloj en aliaj landoj.”* Pri la tutaĵo de ELK MacGill resumas per unu sola esprimo: *Epokfara!*

Laŭ Opulskené (2011), la *“granda formato kaj la aspekto de la libroj tuj memorigis la kutimajn lernolibrojn kiujn oni uzas en lernejoj por instrui fremdajn lingvojn.”* Kaj aldonas, ke abundo de dialogoj, desegnaĵoj, bildoj kaj ekzercoj por ripetado polurante la prononcadon troviĝas. La pravigo estas, ke *“la ĉefa celo estas tuj paroligi homojn.”* Kaj atentigas, ke ĉe *“la fino de la lernolibro estas laŭpaĝa vortlisto, kaj lernanto povas tuj noti la tradukon de novaj vortoj al nacia lingvo aŭ priskribi novan vorton en Esperanto.”* Cetero, tiu rimedo montriĝas efika helpilo por memorigo de ĵuslernitaj vortoj kaj iel temas pri novaĵo inter similaj lernigaj verkoj. Kaj bonvenas la sondisko: *“kutime komencantoj dum lecionoj aŭdas nur sian instruiston kaj ebleco sperti diversajn voĉojn estas tre bonvena.”*

Universitata stud-laboraĵo

Post tiu trarigardo, nepras iom pli akurata referenco al la studlaboraĵo de Llinars (2010), kies celo, analizo de la taŭgeca grado de E-lernolibroj al la nunaj pedagogiaj principoj pri dualingvokirado, efektiviĝas post sindemandi pri la kriterioj definantaj modelan libron por lernado de la angla. Per komparativaj tabuloj pri la analizo de 17 diversepokaj E-lernolibroj, kiuj uzas malsamajn metodojn kaj sti-

lojn, la Aŭtoro konkludas pri la urĝeco de du punktoj: modernigo de lernolibroj pri la Lingvo Internacia kaj formado de nova generacio de instruistaro konanta kaj uzanta aktualajn metodologiojn de lingvoinstruado. Aldone, li defendas, ke *“pli grava ol la rezulto mem, estas la listigo de la kriterioj por taksu la taŭgecon de lernolibro”*, precipe pro tio ke, *“ĉiuj kriterioj proponitaj deriviĝas de la nuntempaj pedagogiaj teorioj pri akirado de fremdaj lingvoj”*. Fine konstateblas la plej altaj poentoj de ELK kompare la aliajn lernigaĵojn. Konstatinte gravajn mankojn en la plejparto de la materialo, Llinars reliefigas, ke *“bonŝance ene de la analizita lernolibraro estas kelkaj laŭdindaj esceptoj: Kunvojaĝu, Tendaraj tagoj aŭ Esperanto por lernejoj klasoj, proponas tre interesan evoluon vojon por modernigi la E-lernolibrojn.”* Tial niaj lastaj vortoj estu la subaj konkludaj, ĉe la paĝo 26:

Nur la tri lernolibroj kiuj uzas situacikomunikon metodon estas iel kompareblaj al la neesperantaj libroj por lerni fremdajn lingvojn. Kunvojaĝu proponas kelkajn interesajn taskojn, kvankam la libro malallogas aspektas. Tendaraj tagoj prezentas multajn komunikajn ekzercojn kaj allogajn ludojn.

Bedaŭrinde ĝi estas elpensita ‘unuavice por lernantoj inter dek- kaj dekkvarjaraj’, kvankam povas esti, kaj fakte estas, ofte uzata por plenkreskuloj’.

Fine Esperanto por lernejoj klasoj estas eble la plej moderna kaj kompleta el ĉiuj libroj analizitaj. Kvankam havas kelkajn mankojn (strangajn vortojn aŭ esprimojn, ne uzas realajn tekstojn...), temas pri evoluiganta proje-

to (fakte jam aperis la dua volumo, verŝajne eĉ pli bona ol la unua) kaj la aŭtoro pretas plibonigi ĝin en venontaj eldonoj. Sed pli grave ol la libro mem, estas la lumo alportita en la obskura vojo de la modernigado de E-lernolibroj. Ni esperas ke la apero de tiu ĉi libro markos limon inter la antaŭo kaj la posto de verkitaj lernolibroj de Esperanto.

Jen kion mi celis proponi al la esperantistaro: Ĉu post tiu trarigardo de la plej elstaraj recenzistoj jam ni rajtas agnoski ke Esperantujo havas nun lernilaron samrangan kun la ceteraj plej konataj fremdaj lingvoj?

Referencoj

KOVÁTS, K. (2010). *Recenzo pri ELK*. Esperanto. 1242 (12) decembro 2010, 251.

<http://edukado.net/biblioteko/libroj?iid=22696&s=daffa08aac2c4db0741a80e92dd24d08>

http://edukado.net/upload/enhavo/dosieroj/Recenzoj_Katalogo/Barboza_recenzo_Kovats.pdf

MACGILL, S. (2011). *Epokfara lernopakaĵo*. Recenzo de ILEI pri Esperanto por Lernejoj Klasoj. IPR. N-ro 2011/1.

NASCENTES, P (2007). *Paroligante la lernantaron*. Brazilei, jaro 2, n-ro 5, 2007, p. 38-46.

<http://www.gazetejo.org/node/1388>

OPULSKIENÉ, G. (2011). *Trafe al celo*. <http://esperanto.org/Ondo/Ondo/202-lode.htm#16>

<http://sezonoj.ru/2011/08/recenzo/>

TENORJO, J. (2009). *En la klason venis nova vento*. BRAZILEI, jaro 3, n-ro 11, 2009, p. 31-

¹ Brazila emerita profesoro pri la Portugala (UnB) kaj pri Esperanto. Internacia ekzamenanto pri Esperanto ĉe ITK/Edukado.net

Fariĝas 70-jara "La Vidvineto" en verda vesto

Benedicto Silva

Antaŭ precize sepdek jaroj aperis la romano "La Vidvineto" José de Alencar (1829-1877), en traduko de Porto Carreiro Neto.

Laŭ la *Antaŭparolo* de la tradukinto, ĝi estis lanĉita en decembro 1941.

Ĝin eldonis la tiamaj eldonistoj Irmãos Pongetti, Editores (Fratoj Pongetti, Eldonistoj, en Rio-de-Janeiro).

Oni povas imagi al si la ĝojon de la brazilaj esperantistoj, kiam ili enmanigis la romanon de la fama brazila romantisma verkisto, freŝe esperantigitan de Porto Carreiro Neto, "la senkompara konanto de la zamenhofa lingvo".

La apero de tiu traduko certe donis al la brazila esperantistaro la grandan esperon vidi aliajn verkojn de Alencar kaj de aliaj naciaj verkistoj en la bela, flua lingvaĵo de tiu talenta stilisto.

Tamen, Porto Carreiro Neto elektis alian vojon por brile kaj plue utiligi Esperanton: la spiritismajn verkojn, aŭ didaktsciencajn, kiel "La Libro de la Spiritoj", "La Libro de la Mediumoj" ktp, aŭ doktrinajn, riĉajn je edifaj instruoj bazitaj sur la kristana moralo de la Evangelio.

Cetere, malgraŭ sia engaĝiĝo en la spiritisman movadon, li postlasis al la estontaj generacioj de esperantistoj ĉarmajn literaturaĵojn paĝojn, interalie en "Tipoj kaj Aspektoj de Brazilo" (1945), "Antologio de Brazilaj Rakontoj" (2-a eld., 1954).

Se, unuflanke, la profana brazila literaturo

perdis, aliflanke la internacia esperantistaro, inkluzive de la nialanda, multe profitis el la legado de la mediumaj romanoj majstre esperantigitaj de Porto Carreiro Neto.

Revenante al "La Vidvineto", certe pluraj legantoj legis, antaŭ 70 jaroj, la recenzon aperintan pri ĝi en la fama revuo Franca Esperantisto, januaro-februaro 1946, p. 4:

J. de Alencar estas la plej originala el la brazila (sic) verkistoj kaj kelkaj el liaj romanoj jam havis la privilegion de traduko en plurajn lingvojn. La Vidvineto ne kalkuliĝas al la plej famaj verkoj de Alencar, ĝi estas agrabla rakonto, iom sirope romantika, priskribanta morojn kaj kutimojn en la urbo Rio de Janeiro antaŭ 100 jaroj; la loka ecaro aldonas tute apartan ĉarmon al la romano.

Lingve tre klara, zamenhofa libro, ĉiel rekomendinda. Kio estas hombro-ludo pĝ 30? MARCEL DELCOURT."

Jen demando, eble naiva aŭ impertinenta, kiun nun faras ĉi tiu modesta esperantisto, en la profunda internlando de Brazilo, post 70 jaroj:

Ĉu la recenzisto de la fama Franca Esperantisto, estante mem franco (laŭ sia nomo), ne sukcesis rilatigi hombron al la franca vorto hombre?

Finfine, ni, la posteuloj de Porto Carreiro Neto, ne povas ne danki lin por la netaksebla trezoro, kiun li postlasis al ni per siaj tradukoj de beletraj kaj spiritismaj paĝoj, kiuj trakuras la mondon kiel modeloj de lingvaĵo kaj stilo.

La tago de Homeopatio

Aymoré Vaz Pinto

La 21 de Novembro oni komemoras la Tagon de Homeopatio en Brazilo. Tiu tago estis elektita por komemori Homeopation ĉar tiu tago markas la alvenon en Brazilon de la franca kuracisto, D-ro Benoit Mure, en la jaro 1840, kiam li komencis praktiki kaj disvastigi Homeopation en la ŝtato Santa Catarina. Benoit Mure en Santa Catarina kaj D-ro Vicente Martins, portugala kuracisto, en Rio de Janeiro, estis pioniroj en la enkonduko de Homeopatio en nia lando.

La Eldona Komisiono de BE decidis publikigi resumon de la vivo de la genia Cristian Frederico Samuel Hahneman, malkovro de la homeopata metodo, kiel kontribuo al la Tago de Homeopatio. Ni diras ke SH estis malkovro kaj ne kreinto de la Homeopatio, pro tio ke la kuracaj leĝoj estas en la naturo. Pri Zamenhof ni povas diri ke li estis la kreinto de la Internacia Lingvo.

Samuel Hahneman kaj Zamenhof havis kelkajn komunajn trajtojn:

Ili ambaŭ estis kuracistoj; ili ambaŭ ŝatis studi fremdajn lingvojn; ili ambaŭ estis misiuloj. Zamenhof estis misiulo de la paco, ĉar Esperanto unuigas homaron. Samuel Hahneman estis misiulo de la kuraca arto. Li alportis al la homaro novan kuracmetodon – la Homeopatio, kiu, ekde ĝia apero en 1876, kiam SH anoncis la malkovron de nova kurac-

metodo, jam plibonigis la sanon de miljardoj kaj miliardoj da homoj.

Li naskiĝis en Meissen, malgranda urbo de Saxonio, Germanio.

Kvankam li ne estis riĉa homo, en lia adoleska aĝo li studis en Sankta Afra, lernejo por la nobeloj. Li studis inter la riĉuloj ĉar, prof-ro Muller, koninte lian kapablon, indikis lin kiel estipendiulon de la reĝo.



Cristian Frederico Samuel Hahneman

En 1775, je la aĝo 20-a, li translokiĝis al Leipzig, universitata urbo. Li studis medicinon, kaj plaĉis al li, ankaŭ literaturon. Li studis medicinon dum tage kaj laboradis pri traduko dum nokte por la leipzigaj eldonistoj, subtenante, tiamaniere, siajn universitatajn studojn.

En 1871 li alvenis Dessau-n, kie li edziĝis kun la duonfilino de apotekisto. Li komencis sian profesion vivon en la provinco Gomers, regiono de kamparanoj kaj de ministoj. Liaj pacientoj estis homaj povraj kaj simplaj. Li provis helpi la kamparanojn kaj instruis ilin pri higieno, ĉar li rimarkis ke multaj el iliaj malsanoj originis de la malpuraĵoj de tiu popola simpla kaj malklera. Tiam li skribis libron pri higieno: *"La amiko de la sano"*.

En 1785 li translokiĝis al Dresden kie estis hospitalo kaj fama kuracisto, D-ro Wagner. Li ĉiam serĉis pri novaj konoj. Kelkfoje li senpezigis sian koron dirante: *"Mi marŝis ĝis nun serĉante pri la kuracaarto kaj tiu*

BE

B
r
a
z
i
l
i
a

E
s
p
e
r
a
n
t
i
s
t
o

15

N
r
o

3
3
7

J
u
n

2
0
1
1

konstanta marŝado ne kondukis min al la bonan celon – mi ne scias kuraci”.

Unu tagon, SH iris al eldonejo por redonisian traduklaboron pri la libro “*Abelardo kaj Eloiza*”, kiam la eldonisto transdonis al SH alian verkon, ĉi-foje, la verkon de Cullen, pri la Kino el Peruo, konata pro sia efikeco kuraci la intermitan febron.

SH, tradukante la libron, malakordis je la klarigo de la aŭtoro pri la ago de la kino. Antaŭ ol diskonigi la skribaĵojn de Cullen, li decidis eksperimenti la medikamenton en si mem. Laŭ li, por koni la efikon de la medikamento, oni devas nepre eksperimenti ĝin en sana organismo.

Li englutis la kinon kaj suferis la intermitan febron. Oni scias ke tiu medikamento eblas kuraci la febron. Li denove englutis la kinon kaj denove suferis febron. Tiam, li rememoris la aserton de Hipokrato: “*Similaĵo kuracas similaĵon*”. Li rememoris ankaŭ Paracelso kiu studis kaj serĉis pri la simileco. Li eksperimentis aliajn medikamentojn, kaj la Leĝo de Simileco konfirmiĝis. Nun la Leĝo de Simileco sin prezentis al li tute klara:

**“ Por kuraci malsanulon oni devas uzi medikamenton,
Kiu en la sanaj homoj provokas similajn simptomojn ”**

Kompreneble ke en la komenco okazis la kutimaj luktoj kiam nova vero detruas konsekritajn erarojn.

Kvankam la bonaj rezultoj kaj la resanigoj de la homoj, la kuracistoj kaj la apotekistoj persekutis SH.

Pro tio li vojaĝis al Hamburgo, Braunschweig, Wolfemburgo, Koeningslutter, Erlemburgo, Wittembergo, Dessau, Torgau.

En Turgau li ĵuas pacan periodon kiun li profitis por eldoni la libron “*Organon de la kuraca arto*”, la baza libro de Homeopatio. Pro instigo de D-ro Clarus SH estis persekutata kaj restis sube la protekto de Duko de

Anhalt Koeten.

La kuracoj multobliĝas. Furoris la novaĵo pri la resanigado de la Ĝenerala Konsilanto de Berlim, Baumgartner.

SH travivis malfacilajn tempojn. Mortis lia edzino, unu el lia filo malaperis enter aliaj malagrablaj okazintaĵoj.

Li daŭris plibonigante la homeopatan metodon, serĉante la malgrandan dozon kaj skribante liajn notojn.

Tiam ekscenas Melanie d’ Hervilly. Melanie estis juna francino, pentristino kiu iĝis tuberkuloza kaj decidis sin kuraci per la nova kuracmetodo. En Koeten okazis la renkonto, la kuracado, la interŝanĝo de sentimentalaj impresoj. Melanie admiris la serenecon de tiu eksterordinara homo. Ŝi decidis helpi kaj SH kaj la disvastigadon de Homeopatio.

En 21 de Junio 1835 SH kaj Melanie, geedziĝintaj, alvenis Parizon.

La unuaj homeopatoj, D-ro Leon Simon kaj D-ro Joudan ĉirkaŭas la majstron. Naskis la Homeopata Societo. Komencas la unuaj sukcesoj de la Homeopatio kaj ankaŭ novaj luktoj ĉe Parizo. La Medicina Akademio petis la malpermeson de la Homeopatio al Ministro Guizot de Ludoviko Felipo. La respondo de la Ministro estas leginda de ĉiuj:

“Hahnemann estas granda merita saĝulo. La scienco estas por ĉiuj. Se la Homeopatio estas ĥimero aŭ senvalora sistemo, ĝi falos por si mem. Se, kontraŭe, temas pri progreso, ĝi kreskos spite ĉiuj agoj celante ĝin sufoki. La Akademio, kiu misias instigi la sciencon, devas, antaŭ ol iu ajn, kuraĝigi la malkovrojn”.

Hah! se ni havas homon tian kiel ministro ĉe ni, nia historio estus tute alia.

Je la fino de Julio 1843 SH estis malsana kaj asistite de Melenie kaj D-ro Krozerio, li forpasis, lasante al ni la homeopatan metodon kun la klarigo pri la minimuma dozo, la dinamizita medikamento, la individualigo de la medikamento, la kronikaj malsanoj, la susceptibleco inter aliajn kontribuaĵojn.

Brazila Kroniko

BEL-Estraro

Kio okazas en via Regiono

NETI



Ekde la jaro 2004, en NETI (Nukleo por Instruado de la Tria-aĝuloj) de Federacia

Universitato de Sankta Katarino (FUSK), Antonio Felix da Silva, kiel volontulo instruas la Internacian Lingvon Esperanton al la Tria-aĝuloj. Tiel FUSK estas la kvara universitato en la mondo, kiu instruas la Lingvon Esperanton al la Tria-aĝuloj.

Ĉi jare okazis en FUSK la 10-a SEPEX de 19-a ĝis 22-a de Oktobro Dum la SEPEX havis 164 ekspoziciajn budojn pri: NETI, komunikado, kulturo, homrajto, edukado, institucia medio, teknologio kaj laboro.

La 20-an de Oktobro matene, okazis ĉe NETI la "Parolu Nacioj", kiu estas: la kunveniĝo de eks-terlandaj lingvo-instruistoj, kiuj instruas al la Tria-aĝuloj por paroli pri la lingvo, kiun ĉiu el ili instruas. Tiam ĉeestis la instruistoj de la lingvoj Germana, Itala, Hispana, Esperanto kaj Angla. En tre agrabla etoso ĉiuj parolis pri siaj laboroj en NETI.

Inter aliaj tie flagoj estis la Esperanta flago. Laŭ Antonio Felix da Silva



Novembra Kulturkunveno

Esperanto-Asocio de San-Paŭlo – EASP – plezure akceptis la gaston Odamir Feitosa, kiu regalis la vizitintojn de la **Novembra Kulturkunveno** per diskutrondo por debati la temon: "**Vojoj: eta agendo - simplaj agoj**".



Per tiu aranĝo, la gvidinto de la diskutrondo intencis stimuli debatintojn al adopto de simplaj plenumebaj agoj cele al estigo de eksperimenta movadagendo por lokaj agemaj esperantistoj, lernantoj kaj simpatiantoj de la lingvo.

La du-hora kunveno okazis en la lasta sabato de la monato, la 26an de novembro ekde la 4-a posttagmeze. La sidejo de EASP situas ĉe strato Faustolo, 124, en la kvartalo Lapa.

Por pliaj informoj sendu mesaĝon al estraro@easp.org.br aŭ kontaktu rekte la preleginton rimado7@yahoo.com.br.

1-a Centrokcidenta Renkontiĝo de Esperanto

Okazos en la urbo Catalão, ŝtato Gojaso, la **1-a Centrokcidenta Renkontiĝo de Esperanto**. Tiu grava evento por la esperanto-movado de la centrokcidenta regiono (kaj ankaŭ por brazila e-movado) okazos de la 6-a ĝis la 8-a de Julio venontjare kaj ĝi jam havas la ĉeftemo, kiu estas **Esperanto-movado en la Centrokcidenta Regiono**.

En la 1-a CORE la partoprenontoj ĝuos alkvalitajn prelegojn farotajn de estimataj samideanoj kaj samideaninoj, kaj ankaŭ muzikajn prezentadojn.

Agendu en via esperantaj eventoj **E**vian ĉeeston en tiu neperdebla okazaĵo.

HELMUTH SCHENK (1923/2011)

Helmuth Schenk, emerita fiska kontrolisto kaj frato de Symilde Schenk Ledon, estis unu el la dekoj da samideanoj, kiuj voĉdonis favore al la kunfandiĝo de Brazilia Esperanto-Ligo kaj Brazilia Konsilantaro de Esperanto, la 14-an de decembro 1985. Tiu fakto montras, ke li vere partoprenis nian movadon.

En la verko "Historio pri la esperanta movado en Brazilo", kunordigita de Osvaldo Pires de Holanda, troviĝas la sekvanta informo: "La 24-an de aŭgusto 1947 estis fondita Esperanta Societo de Pelotas, iniciato de Helmuth Schenk kaj de lia fratino Symilde Schenk".

Helmuth estis la unua prezidanto de tiu organizaĵo.

18

En 1947, li iris al la urbo San- Paŭlo partopreni en la 11-a Brazilia Kongreso de Esperanto, kiel reprezentanto de la ĵus fondita societo.

Pro profesia kialo, Helmuth transloĝiĝis al São Paulo kaj aliĝis al Esperanto-Asocio de San-Paŭlo(EASP), kunlaborante kun multe da esperantaj taskoj faritaj de sia fratino Symilde, unu el la plej elstaraj brazilaj esperantistinoj. Symilde estis prezidanto de EASP kaj de BEL, krom komitatano A de UEA. Kune kun sia edzo, Gilbert René Ledon, partoprenis aktive en multaj brazilaj kaj eksterlandaj kongresoj.

Membro de Brazilia Esperanto-Ligo (BEL) kaj de Universala Esperanto-Asocio (UEA), Helmuth faris superan ekzamenon kaj ricevis diplomon de BEL, en la jaro 1964. Laŭ informo aperinta en la revuo Brazilia Esperantisto (novembro-decembro 1965), Helmuth estis premiita en konkurso de traduko organizita de BEL.

En 2002, Helmuth ĉeestis la 87-an Universalan Kongreson de Esperanto, kiu okazis en Fortaleza, Cearao, Brazilo.

La 14-an de septembro 2011, en la urbo San-Paŭlo, forpasis la neforgesebla Helmuth Schenk, kiu naskiĝis la 9-an de decembro 1923, en Portalegro, ŝtato Sud-Riogrando, Brazilo.

Libroservo de Brazilo

Esperanto-Ligo

ESPERANTO

POR LERNEJAJ KLASOJ

Paroliga metodo kun ekzercaro

1

Josias Barboza

UP-BEL

2008. 164 pg. 28cm.

Esperanto por lerneaj klasoj 1.

Josias Barboza. Brasília: UP-BEL. 2008. 164 pg. 28cm. Paroliga metodo kun ekzercaro kaj kd-sono, tute en Esperanto. Nivelo A1-A2-B1 laŭ Komuna Eŭropa Referenckadro. Libro de la lernanto aŭ libro de la instruisto kostas la samo, unuope, R\$50,00 + sendokosto.

Marcos Antônio Ferreira Teixeira

Esperanto
Baza Kurso

Esperanto Baza Kurso.

M.A.F.Teixeira. Florianópolis: UFSC. 2005. 390 pg. 23 cm. 7 lecionoj kun la 16 fundamentaj reguloj, gramatiko, kaj diversaj kaj gravaj tekstoj por praktiki la legadon. R\$45,00 + sendokosto.

Esperanto por lerneaj klasoj 2.

Josias Barboza. Brasília: UP-BEL. 2010. 178 pg. 28cm. La dua volumo de la paroliga metodo kun ekzercaro kaj kd-sono, tute en Esperanto. Nivelo B1-B2 laŭ Komuna Eŭropa Referenckadro. Libro de la lernanto aŭ libro de la instruisto kostas la samo, unuope, R\$50,00 + sendokosto.

ESPERANTO

POR LERNEJAJ KLASOJ

Paroliga metodo kun ekzercaro

2


Josias Barboza

UP-BEL

2010. 178 pg. 28cm.

Vojaĝo en Esperanto-lando.

B.Kolker. Rotterdam: UEA. 2005. 280 pg. 24 cm. Perfektinga kurso de Esperanto kaj Gvidlibro pri la Esperanto kulturo. R\$59,00 + sendokosto



Ilustrita Metodo de Esperanto.

Y.L.Seguin. Belo Horizonte: EEE. 1977. 123 pg. 28 cm. Tute ilustrita, ĉi tiu kurso estas bazita sur la laboro de Dr. William S. Benson kaj inkludas Ekzercaro de Zamenhof. R\$30,00 + sendokosto.

ILUSTRITA
METODO
DE
ESPERANTO

Alcides Sartorato
Esperanto
para principiantes

Esperanto para principiantes.

A.Sartorato. Brasília: BEL. 2008. 130 pg. 22 cm. 16 lecionoj kun propra vortaro. Nur la libro R\$25,00 + sendokosto. KD-Sono kun lecionoj kaj dialogoj vendata malkune. R\$10,00.

Esperanto em método ilustrado.

S.Marcek. Slovakio: autoro. 2007. 114 pg. 25 cm. Kurso kun 22 lecionoj, ilustrita, kun vortaro kaj gramatiko en portugala lingvo. R\$30,00 + sendokosto.

ESPERANTO
EM METODO
ILUSTRADO

Esperanto de nivelu al nivelu.

Korody Z., Kovacs M., Salomonne C.P., Dr. Szabo L. Budapest: ELTE-ITK. 2008. 136 pg. 24 cm. Lingva ekzmeno origo. Tiu ĉi libro celas helpi la preparigon je la ekzameno en niveloj B1, B2 kaj C1. R\$42,00 + sendokosto.

ESPERANTO
de nivelu al nivelu

C1
LINGVA EKZAMENO
ORIGO

ELTE-ITK



**NIAJ NOVJAROJ SALUTOJ KAJ
BONDEZIROJ IRAS AL ĈIUJ
ESPERANTISTOJ**

AMON KAJ PAĈON EN 2012 !